
# Boletin

de la Federación Española de Esperanto



N-ro 316 - MAJO - JUNIO - 1994

# Boletín

BULTENO DE HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO

Aperanta de 1949



## Ĉefredaktoro

Antonio Marco Botella
Av. Compromiso de Caspe 27-29, 9º C
ES-50002 Zaragoza

## Redaktoroj kaj kunlaborantoj

Salvador Gumá Clavell
Miguel Fernández Martín
Vicente Hernández Llusera
Andres Martín González
Luis Serrano Pérez
Miguel Gutiérrez Adúriz
Antonio Valén Fernández



**Federación Española de Esperanto**
(Información y administración)

**Hispana Esperanto-Federacio**
(Informado kaj administrado)

Rodríguez San Pedro 13-3º-7
ES-28015 MADRID
Telefono + faksilo: +34-(9)1-446-80-79

## Estraro

*Prezidanto*: Antonio Alonso Núñez
*Sekretario*: Marcos Cruz Martín
*Vicprezidanto*: José Mª Galofré Domingo
*Kasisto*: José Mª Bernabeu Franco
(Konto: 14.011.966 de Caja Postal)

*Kovrilo:* Miguel Gutiérrez (Liven Dek)


*Noto:* Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.

## ENHAVO


Niaj venontaj paŝoj . . . . . 3
Kunvoko al la Ĝenerala Kunsido de HEF . . . . . 5
Raporto de la Estraro . . . . . 5
Malfermiĝas nova pordo *Michela Lipari* . . . . . 8
Spezokonto de HEF por la jaro 1993 . . . . . 9
Spezokonto de la Libroservo por la jaro 1993 . . . . . 10
La HEF-Oficejo sur la reloj *Marcos Cruz* . . . . . 11
Viglas la movado . . . . . 13
Denove pri hispana-esperanta vortarego . . . . . 18
Originala poezio: *Timothy B. Carr* . . . . . 20
Mimoo pri la koncepto de la skolo analiza *Ŝulco Rikardo* . . . . . 21
La magio de la parolo *María Pilar* . . . . . 24
Recenzoj: Adresaro de hispanaj E-Grupoj *J. Carlos Ruiz* . . . . . 25
Recenza aldono *Antonio Valén* . . . . . 26
Laŭtema indekso de "Nuevo método de Esperanto" *Antonio Valén* . . . . . 27

# Niaj venontaj paŝoj


Ekzistas certa maltrankvilo en niaj medioj post relego en "Boletín" de insistaj pesimismaj opinioj aperintaj en nia organo pri la nuna stato de la Esperanta Movado en nia lando. Oni volis doni al ni impreson pri krizo en la funkciado kaj futuro de HEF, kaj tamen tiaj alarmaj voĉoj tute ne respondas al la realo. La vero estas, ke en tiu ĉi momento kelkaj bazaj servoj (Sekretariejo, Administrado kaj Financoj, Libro-Servo, eldonado de libroj kaj nia "BOLETIN") funkcias pli bone ol ili funkciis laŭlonge de pluraj jardekoj. La apero de junaj valoroj, kiuj plialtigis la prestiĝon de la hispanaj esperantistoj eksterlande, kompletigas iamaniere nian nepesimisman vidpunkton pri la stato de Esperanto en nia lando. Sed unu afero estas, ke tiuj bazaj servoj de nia Federacio ege pliboniĝis, kaj alia estas, ke ni, la nuna gvida skipo de HEF, nin sentas kontentaj kaj eĉ konsideras sufiĉaj niajn atingojn. Tio, tute ne!. Kaj ni tuj eksplikas la kaŭzon.

Lastatempe ni konstatis certan nenormalan funkciadon de la diversaj hispanaj Esperanto-Grupoj kaj efektivan regreson en la nombro de nia membraro. La motivo estas vere simpla: maljuniĝis nia anaro kaj laŭ natura vivoleĝo niaj veteranoj iom post iom malaperas, kaj tiuj bedaŭrindaj perdoj ne ricevas laŭnombre la kompenson de novaj membroj. Al tiu fakto aldoniĝas alia fenomeno ankaŭ nebremsebla: ŝanĝiĝas la vivokutimoj de nia socio, kaj kun tiuj ŝanĝiĝoj niaj instrumetodoj fariĝas kadukaj, nia propagando neefika kaj fiaskas nia varbadosistemo. Resume, ni konstatas, ke la situacio eroziiĝas, kaj tio, neeviteble, kondukas nin al la konkludo, ke ni bezonas renovigon por pluvivado kiel eble plej baldaŭ.

La estraro de HEF ne falis en neutilajn plendojn kaj alarmemojn, tute simple akceptis/as la realon kaj jam pasintjare komencis plani kiel pli efike agi por superi la malfacilajn cirkonstancojn. Oni skizis projektojn, sed ĉiam oni trovis sin antaŭ sama baro: oni bezonas trovi homojn por plenumi ilin. Nun ni opinias, ke jam alvenis la momento por ilia efektivigo. Sen novaj prokrastoj.

Kompreneble, tiu problemaro ne estas afero solvenda de tiuj kvar-kvin personoj, kiuj strebas ĉiutage ene de la gvida aparato de HEF por antaŭenpuŝi la aferon. Ni bezonas ĉies kontribuon kaj tiucele ni invitis ĉiujn

gvidantojn de hispanaj Esperanto-Grupoj partopreni la esperigan entreprenon krei la necesajn instrumentojn por daŭrigi nian taskon kun novaj pli efikaj elementoj, kiuj ebligos nian sukceson.



*Nun eblas kreski, sed...*
*ĉu ni timas?*

Nia celo estas debati niajn problemojn en la venonta kongreso okazonta en Malago, sed ne per longaj esperantismaj diskursoj kaj nedifinitaj projektoj, sed per tiuj konkretaj dosieroj rigore elektitaj, kiujn ni invitis prezenti en la Centra Oficejo al ĉiuj gvidantoj de Grupoj kaj Asocioj de nia lando. Ni ne volas malkovri la fajron, nek serĉi miraklajn solvojn, sed pragmate decidi pri niaj mankoj plej gravaj kaj niaj bezonoj plej urĝaj. Ni jam detektis ĉi tiujn:

1. Bona gramatiko taŭga por komencantoj.
2. Esperanta TV-Kurso.
3. Tutlanda perkoresponda Esperanto-kurso.
4. Perioda sed persista propagando pri Esperanto per artikoloj en la hispanaj lingvoj en la plej gravaj ĵurnaloj de nia lando, kaj aliaj propagandaj sistemoj.
5. Funkciigo de "Fundación Esperanto" por eldonaj projektoj, internaciaj beletraj konkursoj, organizado de seminarioj, ktp.
6. Aplikado de Esperanto al komercaj celoj. Ktp.

Kompreneble aliaj temoj devas esti prezentataj, kaj en la anoncita kunveno en Malago oni starigos la koncernan aprioran temarvicon, kiun debatos ĉiu laborkomisiono. Ni konsideras tre grava, ke ĉiu projekto kunportu proponon pri persono aŭ skipo, kiu, laŭ la proponinto, povos plenumi ĉiun taskon, kaj ni devas fari imagostrebon por ke tiu laboro estu alloga por tiuj homoj, sur kies ŝultroj kuŝos tia respondeco. En tiu linio, ni sugestas, ke oni povus krei servojn kun propra financado kaj sekve kun ekonomia profito por la deĵorantoj.

Ni petas al tiuj, kiuj, eble pro troa amo al nia afero alarmas nian anaron, ke ili anstataŭ ol plendi kaj anonci katastrofojn, laboru en tiu ĉi projekto pri renovigo kaj modernigo de nia Movado. Ni esperas ĉies kunlaboron por kuniri solidare akompanate de nia kolegaro en niaj venontaj paŝoj.

*La Redakcio*

# Kunvoko al la Ĝenerala Kunsido de HEF

Kiel indikas nia statuto, la HEF-estraro alvokas ĉiujn anojn al la Ĝenerala Ordinara Kunveno okazonta en Malago, *Centro Cívico*, (Kongresejo) Av. de los Guindos, 48, sabaton, 16an de Julio, je la 16,30 posttagmeze, tuj post la Malfermo de la Kongreso.

## TAGORDO

1. Prezento, lego kaj eventuala aprobo de la protokolo de la antaŭa Ĝenerala Kunveno.

2. Prezento, studo kaj eventuala aprobo de la kontoj de HEF, la Libro-Servo kaj la Centra Oficejo. Debato pri kotizoj de hispanaj Asocioj kaj Esperanto-Grupoj.

3. Oficiala konfirmo de la pasintjanuara decido de HEF-estraro nomumi S-rojn Fernando de Diego kaj Luis Hernández Izal honor-membroj de HEF.

4. Raporto kaj komentado pri aktivaĵoj dum 1993/94 fare de la HEF-Prezidanto.

5. Premio Klara Silbernik.

6. Elekto de du HEF-membroj por kontroli niajn Konto-Etatojn dum la venonta jaro.

7. Demandoj, petoj, proponoj.

Kiel anoncite en la cirkulero sendita al ĉiuj Esperantaj Asocioj kaj Grupoj, la kunveno de prezidantoj kaj akredititaj reprezentantoj okazos la 17an de Julio 1994 (dimanĉo) je la 10a matene.

---

# RAPORTO DE LA ESTRARO

Kara amikaro!

Okaze de nia nova kongreso, ĉi-foje en Málaga, jen la estraro havas la plezuron prezenti al vi la kutiman raporton pri HEF-agado ekde la pasinta kongreso, kiel ankaŭ pri diversaj aliaj aferoj rilataj al Esperanto:

1) Antaŭ ĉio ni devas danki kaj gratuli tiujn homojn kaj grupojn kiuj, jen en la kadro de HEF, jen laŭ propra iniciato kaj laborado por la bono de Esperanto kaj de HEF, sukcesis en siaj strebadoj:

(a) S-ro Augusto Casquero de la Cruz kaj la Valencia grupo kaj amikaro, danke al kies fervoro, kompetenteco kaj oferado la Universala Kongreso fariĝis sukcesa laŭ ĉiuj vidpunktoj. Ĉar pri la Kongreso abunde raportis nia gazetaro, ni substreku nur jenajn du punktojn rekte gravajn por HEF:

— La konsiderinda financa profito kiun HEF ricevis de la ĝeneralaj rezultoj de la Kongreso, kaj pri kio vi ricevas informon aliloke en nia revuo.

— Laŭ la takso de la estraro, la Universala Kongreso konfirmis niajn jamajn sciojn kaj esperojn, ke en Valencia ekzistas tre bona bazo por tre intensa kaj decida partopreno en la gvidado kaj laborado por la Federacio.

(b) Ke la plurjaraj klopodoj, informado kaj agado ĉe oficialaj instancoj de s-roj Gian Carlo Fighiera, Juan Carlos Ruiz Sierra kaj aliaj fine fruktis je tio, ke HEf ricevis la oficialan agnoskon pri Publika Utileco.

(c) Ke la multjara oferado financa kaj la laborado de s-roj: Gerardo Flores Martín, José Mª González Aboín kaj aliaj, kaj nun per la plifortigo de junaj homoj Marcos Cruz, Georgo Kamaĉo, Antonio Valén kaj aliaj, la Centra Oficejo de HEF en Madrido jam estas plene funkcianta realo, kun firmaj planoj ĉiuflankaj por la nuno kaj la estonteco.

(ĉ) Nia ĉefredaktoro, s-ro Antonio Marco Botella. Estas apenaŭ imageble, ke li sukcesas pri tia dankata oferado per laboro, akurateco kaj kvalito, tiel ke "Boletín" daŭre restas la ĉefa juvelo de la tuta HEF-agado.

(d) La zorganto pri Libroservo kaj lia helpantino, S-ro Luis Hernández García kaj s-ino Rafaela Urueña Álvarez, ĉar ne nur ili daŭre tenas efika la Servon, sed eĉ sukcesas ĝin pliampleksigi.

(e) HEF publike ripetas sian dankon al s-ro Antonio Vélez Sánchez, urbestro de Mérida kaj al tiu ĉi urbo, ĉar aldone al ties gastameco, ili prenis sur sin la deficiton de la tiea kongreso —kio ja estas granda pruvo pri la agnosko kiun ili faras al la kultura kaj humanisma valoro de nia agado kaj de Esperanto ĝenerale.

(2) Kiel sciate, la Partito Radicale diskutigis la E-aferon en la Itala Parlamento, kaj sekve de tio, la Itala Ministerio pri Publika Instruado oficiale invitis la koncernajn ministeriojn de Hispanio, franclingva Belgio kaj Nord Rhein-Westfalen al oficiala eksperimenta instruado de Esperanto en pluraj lernejoj el tiuj landoj, kaj en la fino venigi la gelernantojn en Italion por oficiala studo de la rezultoj.


Nu, HEF faris *multajn* demarŝojn ĉe la Hispana Ministerio (per personaj vizitoj, leteroj, telefonvokoj) por scii pri la afero, instigi al pozitiva respondo, proponis eĉ senpagajn instruistojn por la eksperimento, ktp.

Sed la sola ĝisnuna konkreta oficiala rezulto estas tiu t.n. "administracia silento", tiel ke nenian respondon oni

sendis (eĉ, ŝajne, la unua oficiala invito perdiĝis en la poŝto, kaj oni devis ĝin ripeti, ktp).

La estraro opinias, ke tia silento estas nedigna kaj en rilato al alilanda ministerio (krome, ankaŭ de la Eŭropa Unio), kaj al la asocio de Publika Utileco "Hispana Esperanto-Federacio" kaj al Esperanto, kaj al kulturo ĝenerale: La ĉefa HEF-peto estas, ke se de Esperanto-uzantoj venu la ĉefa laboro kaj oferado, tamen la institucia kaj infrastruktura apogo nepre venu de la oficialaj instancoj, *ĉar ili tion ŝuldas al ni.*

En nia Málaga kongreso ni devas veni al decido pri firma ago, ĉar tia oficiala sinteno montriĝas netolerebla.



(3) Sinjoro Juan Azcuénaga Vierna rezignis la UEA-ĉefdelegitecon. Oni devas decidi jen pri alia persono kiu pretus preni sur sin tian taskon, aŭ ĉu tio estu nova tasko de la Centra Oficejo.

(4) HEF gratulas kaj dankas Madridan Esperanto-Liceon, ke ĝi eldonis la libron de William Auld "El Esperanto: Fenómeno de la comunicación" laŭ la traduko de Marcos Cruz, kaj, krome, sukcesas ĝin disvendadi al grupoj kaj —imitinde!— ankaŭ pere de librovendejoj.

La estraro de HEF tial varme rekomendas ke ĉiu ano kaj ĉiu grupo nepre aĉetu tiun libron por si mem, kaj ankaŭ pliajn ekzemplerojn por la publikaj bibliotekoj, ĉar sendube ĝi estas ne nur la plej taŭga informilo kaj varbilo de ni disponata, sed ĝi estas vere taŭga.

(4) Pluraj aferoj nun malvolviĝas, tiel ke ankoraŭ ili ne venis al konkretaj rezultoj, kaj tial prefere pri ili ni ne detaligu tie ĉi, sed tion lasu por la stud- kaj diskutsesioj de nia Málaga kongreso: Kontaktado kun lernejoj cele al instruado de Esperanto, ebla kunlaborado en televida kurso, (planata en Nederlando), ebla nomumo "Stacio Zamenhof" al nova metro-stacio en Barcelona, baldaŭa ricevo de iomete grava heredaĵo, netrovado de taŭgaj fotoj por la informilo-varbilo (kies teksto jam estas redaktita), eble nova situacio por ke al HEF venu junuloj de la socia servo kaj muntado de adekvata plano por havigi taskojn al ili, propono de banloka entrepreno pri kultura kunlaborado, ktp.

(5) Por fina punkto de tiu ĉi raporto, la estraro atentigas, ke laŭ la aranĝo de la Málaga-kongreso fare de s-ro Andrés Martín González, ekzistos ebleco tiel por turismado kaj amuziĝo kiel, plej grave, pri *abunda* studado kaj laborado fare de tiuj, kiuj deziras pri ĉi lasta afero.


La estraro petas ĉiujn pri nepra aliĝo kaj fakta partopreno en la kongreso, sincere deziras al ĉiuj agrablan restadon laŭ la personaj preferoj, kaj jam nun kaj antaŭ ĉio, antaŭdankas la pretecon intense labori fare de laboremuloj.

Kun amikaj samideanaj salutoj,

*Antonio Alonso Nùñez,* prezidanto.
*Marcos Cruz,* sekretario.

# Malfermiĝas nova pordo

Malfermiĝis nova pordo inter Esperanto kaj la paralela universo de sciencfikcio. Nia lingvo estis unu el la honoraj gastoj ĉe FANCON 94, dudeka kongreso de la italaj sciencfikciuloj, okazinta fine de aprilo en Courmayeur (Aosta Valo). Antaŭ la ĉefaj tiuĝenraj italaj eldonistoj, verkistoj, tradukistoj, desegnistoj kaj kolektistoj, nia Liven Dek prelegis, en Esperanto kun samtempa tradukado, pri *Esperanto, la fantasta lingvo*. Samtempe li prezentis la 9an numeron de lia sciencfikcia esperanta libroserio *Sferoj*, kiu ankaŭ enhavas esperantigon el itala aŭtoro.



*Aperis Sferoj-9!*

Dum la kongreso, kies aliaj neitalaj gastoj estis la brita verkisto Brian Aldiss kaj la nederlanda ilustristo Karel Thole, prezentiĝis la itallingva libro *La lingua fantastica* (eldonejo Keltia, Aosta), konsistanta ĉefe el la italigo de dudeko da esperantaj originalaj rakontoj, de William Auld, István Nemere, Georgo Kamaĉo, Konisi Gaku k.p.a. Ankaŭ aperas tie, en paralelaj tekstoj esperanta kaj tradukita, 120 versoj el *Poemo de Utnoa* de Abel Montagut. La libro, redaktita de Giulio Cappa, malfermiĝas per entuziasma enkonduko de Harry Harrison. Ĝin ricevis en la kongresa dokumentujo la plejmulto de la kelkcenta partoprenantaro de FANCON 94: oni do povas aserti, ke la ĉefa celo de la eldonaĵo —t.e. sciigi al la itala asciencfikcia mondo, ke Esperanto ekzistas, vivas kaj viglas— jam estas atingita. Krom tio, la itala movado havas do nun je dispono novan tre belaspektan nacilingvan varbilon.

*Michela Lipari*
*Estrarano de UEA pri kulturo*

# Spezokonto de HEF por la jaro 1993

## Enspezoj

| | | |
|---|---|---|
| Saldo favora al HEF la 31an de Decembro 1992 | | 238.096 |
| Enspezo pro kotizoj de E-Grupoj | 100.500 | |
| Valencia UEA-Kongreso | 300.000 | |
| Donacoj de niaj membroj | 64.094 | |
| Donaco de Libro-Servo | 25.000 | |
| Vendokosto bultenoj al Antaŭkongreso | 25.000 | |
| Enspezo pro kotizoj individuaj membroj | 583.512 | |
| SUMAS LA ENSPEZOJ EN 1993 | 1.098.106 | 1.098.106 |
| TOTALA SUMO DE ENSPEZOJ EN 1993 | | 1.336.202 |

## Elspezoj

| | | |
|---|---|---|
| Boletín 309 (pres- kaj sendokostoj) | 53.768 | |
| Boletín 310-eksterordinara | 66.155 | |
| Boletín 311 | 54.744 | |
| Boletín 312 | 55.036 | |
| Boletín 313 | 54.658 | |
| Inkobendoj por komputil-presilo | 1.660 | |
| Aliĝiloj presitaj por la Malaga kongreso | 3.050 | |
| 5.000 presitaj kovertoj por la bulteno | 23.000 | |
| SUMAS LA ELSPEZOJ EN LA REDAKTEJO | 312.071 | 312.071 |

### Elspezoj ĉe la Sekretariejo de Sevilo

| | | |
|---|---|---|
| Poŝtkesto | 1.700 | |
| Poŝtmarkoj korespondado | 1.320 | |
| Pago luo de la sidejo | 4.000 | |
| SUMAS LA ELSPEZOJ EN SEVILO | 7.020 | 7.020 |

### Elspezoj ĉe la Kasisto-Oficejo

| | | |
|---|---|---|
| Fotokopioj, korespondado, HEF-stampilo, kovertoj k.a. | 15.498 | |
| 25 ekz. de "Esperanto, fenómeno de la Educación" por disdono dum la UK | 25.000 | |
| Elspezoj de la Prezidanto okaze de lia vizito al Ministerio pri Edukado | 15.000 | |
| Diversaj elspezoj ĉe Centra Oficejo | 26.413 | |
| Enspezado de kotizoj fare de BANESTO | 719 | |
| Kosto de 2 metal-platoj por Honoraj | | |

| | | |
|---|---|---|
| HEF-membroj | 10.000 | |
| Vojaĝo-kosto de la Prezidanto al enterigo de D-ro Juan Régulo Pérez | 90.450 | |
| Enspezado de kotizoj fare de Poŝta Kaso: | 10.650 | |
| Eldono de "Tirano Banderas" | 163.162 | |
| Resendo de kvitancoj nepagitaj | 2.527 | |
| Sumo | 359.419 | |
| TOTALA SUMO DE ELSPEZOJ EN 1993 | | 678.510 |

**RESUMO**

| | | |
|---|---|---|
| Saldo favora al HEF je 31-12-1992 | | 238.096 |
| Totala sumo de enspezoj en 1993 | | 1.098.106 |
| Totalo | | 1.336.202 |
| Totala sumo de elspezoj en 1993 | - 678.510 | |
| SALDO FAVORA AL HEF JE 31-12-1993 | | 657.692 |

Callosa de Segura, 31an de decembro 1993

*La Prezidanto*
*Antonio Alonso Núñez*

*LA KASISTO*
*José M-a Bernabeu Franco*

---

# Spezokonto de la Libro-servo por 1.993

| | | |
|---|---|---|
| Antaŭa Saldo | | 5.420 |

**Enspezoj**

| | | |
|---|---|---|
| Vendado de libroj | 934.905 | |
| Interezoj en la Poŝta Kaso | 72 | |
| Diversaj abonoj por 1993 | 35.115 | |
| Aliaj enspezoj | 37.315 | |
| ENSPEZOJ EN 1993 | 1.007.407 | 1.007.407 |
| ENTUTE | | 1.012.827 |

**Elspezoj**

| | |
|---|---|
| Aĉetado de libroj | 688.863 |
| Materialo por oficejo | 53.275 |
| Poŝto (poŝtmarkoj,O.I.C.) | 60.535 |
| Transporto de libroj | 48.685 |
| Bankaj elspezoj | 16.776 |

| | | |
|---|---|---|
| Diversaj abonoj en 1993 | 45.967 | |
| Transdono al HEF | 25.000 | |
| Aliaj | 34.885 | |
| ELSPEZOJ | 973.986 | 973.986 |
| SALDO AL NOVA KONTO | | 38.841 |
| ENTUTE | | 1.012.827 |

Valladolid, la 31an de decembro 1.993
*Luis Hernández García*

# La HEF-oficejo sur la reloj

Kiel sciate la HEF-oficejo trairas drastan kaj malfacilan modernigadon. Tiu laboro nun finiĝas, sed necesas iom diri pri ĝi

La finajn paŝojn por akiri propran lokalon faris s—roj Ángel Figuerola kaj Gerardo Flores en 1971. Poste, dum kelkaj jaroj, la HEF-administrado kaj la Boletín-redaktejo funkciadis en la HEF-oficejo. Bedaŭrinde, kiam tiuj HEF-fakoj viciris en alian urbon, la HEF-oficejo restis propraĵo sen propraj rimedoj por agadi nek tasko difinita. Ekde tiam, pluraj madridaj esperantistoj malavare kaj espere subtenadis la ejon aparte de HEF, precipe per la enspezoj de novjara loterio. Tamen, la tiamaj fortoj ne sufiĉis por aktivigi la ejon kaj adapti ĝin al la nuntempaj bezonoj. Tial, fine de la antaŭa jardeko, la HEF-oficejo stagnadis.

En marto de 1991 okazis estrarkunsido en la HEF-oficejo, kaj en ĝi, graŭ propono kaj projekto de novaj esperantistoj el Madrido, estis elektita komisiono por okupiĝi pri la HEF-oficejo (v. Boletín 300). Tamen nenian materian helpon HEF povis oferti al la projekto. La komisiono rajtis agi libere, sed informante la estraron pri la paŝoj farataj.

Jen nun la spezo-raporton de la pasintaj tri jaroj, kune kun tabelo pri la antaŭaj kvin jaroj por komparo.

La moderniga laboro finiĝas. La lokomotivo finfine surrelas. Kelkajn fruktojn ni povas vidi surloke jam de antaŭ du jaroj: la efikon atingitan ĉe vizitintaj informistoj kaj la esperigan rezulton de la novspecaj pagataj kursoj. Mi tre esperas, ke de antaŭ unu jaro, kiam la HEF-oficejo jam okupiĝas pri HEF-administraj taskoj, ankaŭ ekster Madrido oni komencas vidi la fruktojn. Almenaŭ tion ni sentas, pro la plinombriĝo de kontaktoj (poŝtaj, telefonaj kaj faksilaj) kun la HEF-membraro dum la lasta jaro. Ekde 1994, la spezojn de la HEF-oficejo prenas rekte HEF, por kio la likvido kaj necesaj bankaj rearanĝoj estas farataj.

*Marcos Cruz*

En la apuda tabelo:

(1) ekde marto, post la elekto de la komisiono.
(2) neHEFa uzado de la faksilo.
(3) sen la ankoraŭ neredonitaj pruntoj, kiuj sumas 206366 ESP, plus ŝuldo de 37551 ESP restinta el 1990.

| | 1991 [1] | 1992 | 1993 |
|---|---|---|---|
| **ELSPEZOJ** | | | |
| elektro | 8510 | 13435 | 16639 |
| telefono | 18695 | 45084 | 54195 |
| najbarara imposto | 39822 | 60173 | 70801 |
| urbodoma imposto | 9403 | 10614 | 11922 |
| asekuro | 0 | 5536 | 0 |
| mebloj | 54875 | 48083 | 0 |
| purigiloj kaj ripariloj | 20667 | 12790 | 0 |
| laboriloj diversaj | 0 | 16115 | 4539 |
| paperfolioj, kovertoj k.s. | 2300 | 61400 | 1097 |
| afranko | 3443 | 8678 | 16725 |
| fotokopioj | 829 | 5596 | 2294 |
| komputilaĵoj | 0 | 0 | 1794 |
| kursmaterialo | 0 | 5326 | 11626 |
| libroj por vendo | 49389 | 6000 | 11500 |
| libroj por la biblioteko | 0 | 0 | 10225 |
| redono de pruntoj | 0 | 20000 | 42844 |
| bankaj makleraĵoj | 0 | 400 | 275 |
| specialaj elspezoj | 0 | 0 | 274 |
| **sumo de elspezoj:** | **207933** | **319230** | **256750** |
| **ENSPEZOJ** | | | |
| kotizoj kaj donacoj | 106999 | 2000 | 0 |
| pruntoj | 92503 | 176707 | 0 |
| kursoj | 0 | 56500 | 204000 |
| vendo de libroj | 20275 | 56360 | 39450 |
| turismaj servoj | 24283 | 0 | 0 |
| banka interezo | 1 | 16 | 45 |
| fakskopiado [2] | 0 | 0 | 110 |
| fakssendado [2] | 0 | 0 | 7750 |
| faksricevado [2] | 0 | 0 | 1050 |
| vendo de neutilajxoj | 950 | 100 | 75 |
| **sumo de enspezoj:** | **245011** | **291683** | **252480** |
| **JARA REZULTO [3]:** | **37078** | **(27547)** | **(4270)** |

**Unua seminario:**
**"Esperanto: kulturo kaj socio"**


La pasintan 7an de Marto, grupo da geesperantistoj de Madrido kaj Valencio kunvenis en la MEL-sidejo kun la celo starigi la bazon por la okazigo de ĉiujaraj altnivelaj seminarioj, girontaj ĉiufoje ĉirkaŭ unu el la kernaj temoj de nia epoko aŭ de nia movado.

Oni alvenis al la decido premieri jam venontsomere pro la konveno profiti la ĝeneralan impreson pri plifortigo de Esperanto en Hispanio post la UK, kaj elektiĝis "Ksenofobio kaj rasismo en la nuna socio" kiel debattemo.

Tiu "Unua seminario" deruliĝos de la 8a ĝis la 11a de septembro 1994 en Valencio en tristela hotelo, klimatizita, kun kompleta banĉambro kaj aliaj komfortoj. En ĝi la partoprenantoj loĝos kaj laboros. La aliĝkotizo estas 17.000 pesetoj (ĉirkaŭ 230 guldenoj), kio inkluzivas loĝadon, tri manĝojn tage, partoprenrajton kaj labormaterialon.

Partopreno sen loĝado kostos 4.000 pesetojn se la aliĝo estas ĝis la 1a de julio, kaj poste 2.000 pliajn ptojn.

La celo estas debati tiajn gravajn problemojn, bedaŭrinde tro aktualajn, el diversaj vidpunktoj: kultura, socia, jura, politika, etna, familia, labora, medicina, ktp. kaj montri al la socio, ke la Esperanta Movado estas preta alporti solvojn kaj labori por la ŝanĝo de la aktualaj diskriminaciaj leĝoj de la Eŭropa Unio.



Fine de la Seminario oni sendos la konkludojn al la gazetaro, naciaj parlamentoj, Unuiĝintaj Nacioj, UNESKO, Eŭropa Parlamento kaj neregistaraj organizaĵoj.

Tiuj, kiuj deziros prelegi, devas sendi referaĵojn de la prelego kaj resuman biografion antaŭ la 1a de julio 1994. Informoj kaj konstanta adreso pri la Seminario: Grupo Esperanto de Valencia. Seminario. Gran Vía Fernando el Católico, 45, 3-a; E-46008 VALENCIA. Telefono kaj fakso: +34-63401369.

## 15a Hispana-Franca Renkontiĝo

Organizite de la Esperanta Centro "FRATECO" de Zaragozo, la 4an kaj 5an de junio okazos en GRAUS (Huesca), Renkontiĝo de geesperantistoj de ambaŭ flankoj de Pireneoj kun interesa programo: prelegoj, ekskurso kaj, certe, agrabla esperantista etoso. Estis speciale invititaj la Grupoj de Barcelono, Sabadell, Pamplono, Logroño, Vitoria kaj Bilbao, kaj kompreneble, ĉiuj individuaj geesperantistoj de tiu ampleksa norda hispana regiono. Informoj: Esperanta Societo "FRATECO"; C/ S. Vicente de Paul, 1. E-50002 ZARAGOZA aŭ Telf. (976) 22.74.97.

## Unua taranteza semajno

En la valo de Tarentaise, ĉirkaŭata de belaj montaroj, la esperantistoj de tiu ĉi regiono organizas amikan renkontiĝon, okazontan de la 26a aŭgusto ĝis la 2a de septembro 1994. La prezo por la semajno, kiu inkluzivas loĝejon kaj manĝojn, estas 850 f.fr. Informoj: Mr Bernard Bourrut; Av. Tarentaise, 73210-AIME. Francio.

## Letervesperoj en la 2500-jara Samarkando

Samarkandaj esperantistoj nun preparas du internaciajn letervesperojn:

*Dum aŭgusto 1994*: Memore al la 600-jariĝo de la granda scienculo Mirzo Ulugbek (1393-1449), astronomo, teologo, poeto kaj historiisto, kies jubileon oni celebras ĉi-jare sub aŭspicio de UNESKO, kaj

*Dum septembro 1994*: omaĝe al la 3-jara datreveno de sendependiĝo de Uzbekistano.

Tiutemaj materialoj (salutleteroj, reeĥoj, nacilingvaj artikoloj, libroj, dokumentoj kaj fotoj pri la epoko de Timuridoj, Ulugbek, Uzbekistano ktp.) estas tre bonvenaj. La plej interesajn ni publikigos en nia nacilingva gazetaro. Adresu ĉion al: Esperanto-Klubo, Pk. 76, UZ-703-000 SAMARKAND. Uzbekistano

## Gvidlibro pri Maroko

Jam la jaron 1984, dum ekskurso tra tiu Nord-Afrika lando, la sabadellano Roger Mimó Lladós estis tiom fascinata de ĝia oazo TINEHIR, ke li forlasis sian laboron kaj karieron por sin dediĉi traesploradi, per propra aŭto aŭ piede, la plej variajn karakterizaĵojn de tiu teritorio, kiujn li priskribas en sia 124-paĝa libro, ilustrita per fotoj kaj mapoj de li mem faritaj. S-ro Roger Mimó, naskiĝinta en la sino de konata familio esperantista, el la urbo Sabadell,

HEF (91)-446-80-79

**24 horojn tage, respondile kaj faksile.**
**Persone: marde kaj ĵaŭde de 19a ĝis 20a**



# LIBROSERVO

**Mil kaj unu noktoj da bona legado!**

| | |
|---|---|
| Sferoj-8 | 1.000 |
| Sferoj-9 | 1.000 |
| Tirano Banderas | 1.000 |

ATENTU, ke de la 15a de julio ĝis la 15a de septembro la Libroservo de HEF estos fermita.

# Ankaŭ Tegueste

En decido de la 25an de ĉi jara marto, la Urba Konsilantaro de Tegueste (Tenerife), donos la nomon "Esperanto" al promenejo proksima al la placoj de la Preĝejo kaj la Urbodomo.

Laŭ Hugo Röllinguer, la dato elektita por la inaŭguro, la dekduan de septembro, estas ja bela anekdota hazardo, ĉar ĝi koincidas kun la festo de "*Nuestra Señora de los Remedios*", dum Esperanto prezentas sin kiel la sola lingvo, kiu kapablas liveri solidaran komprenon inter ĉiuj homoj.

Laŭ la Prezidanto de UEA, Doktoro John Wells, la nova strato ricevos la numeron 950 en la katalogo, kiun, kun pli ol tricent paĝoj kaj 400 fotoj, eldonos UEA omaĝe al la stratoj, monumentoj kaj placoj, kiuj en urboj de la tuta mondo rekonas la Lingvon Internacian, kaj ties iniciatinton D-ro Zamenhof.

nuntempe kombinas la administradon de malgranda hotelo, instalita en la oazo TINEHIR (Maroko), kun gvidado de turismaj ekskursoj tra la ĉirkaŭaĵoj de la tiuloka montaro.

**Dua konkurso pri poezio**

La kultura Asocio "ĈIELARKO" (Grupo Esperantista) de Alquerías (Murcio), kunvokas "Premion al la Poezio", kiun oni aljuĝos al la plej bona poemo originale verkita en la hispana aŭ esperanta lingvoj pri libera temo.

La limdato por prezentado de originaloj estos la 10a de junio 1994, kaj la premioj, konsistantaj 10.000, 5.000 kaj trofeo por la unua, dua kaj tria respektive, estos disdonataj en monato junio okaze de la urbaj festotagoj. Informoj: Asociación Socio-Cultural "ĈIELARKO"; C/ Gregorio Martínez Montesinos, 3. E-30580 ALQUERIAS (Murcio).

**Esperanta konferenco-94**

De la 16a ĝis la 22a de julio 1994 okazos, en la Kardinal-Wendel-Domo de Homburgo, internacia esperanta Konferenco pri la temo: "Ksenofobio, kaŭzoj kaj rimedoj". Interesaj prelegoj. Lingvo-kursoj. Distraj posttagmezaj ekskursoj. Vizitoj al interesaj lokoj de la regiono. Studo, manĝo, loĝo kune en unu domo. Ŝipveturado sur rivero Saar. La programo kompletiĝos per aljuĝo de OSIEK-premio.

Aliĝoj kaj informoj: Saarländischer Esperanto-Bund e.V.; Sarlanda Esperanto-Ligo r.a.; Querstrasse, 11, D-66287 Quierschied. Tel. 49-0689-7/62142

**Refoje esperanto-stando**

La 23an de aprilo nunjara, okaze de la tago de Sankta Georgo, patrono de Katalunujo, la organizacio KAE prezentis en la urbo Sabadell librostandon, plejgrandaparte provizitan per Esperanto-libroj mem verkitaj aŭ tradukitaj de la bedaŭrata esperantologo tiea, s-ano Luiso Mimo' Espinalt'. La loka ĵurnalo "Diari de Sabadell" informis pri tio kaj aperigis foton kun la librostando kaj kelkaj lokaj geesperantistoj.

**18a Itala Festivalo:**
**Festi sed ne en valo**

Jes, efektive: La "Internacia Junulara Festivalo" oprganizita de la "Itala Esperantista Junularo" okazis ĉi-jare de la 30a de marto ĝis la 5a de aprilo en montara restadejo ĉe Alpoj proksime de Francio. Prave mi povas jesi, ke ĉi tiu renkontiĝo estis tute altnivela, kaj ĉi tio ne nur laŭ la geografia vidpunkto sed ankaŭ laŭ la kvalitva. La restadejo troviĝis meze de superbaj montegoj. Vere ĝi estis tre taŭga loko por reoksigenigi la sangon kaj reesperantigi la koron.


Mi veturis laŭ la spuroj de Hanibalo (sed per pli modernaj rimedoj) kun du simpatiaj geamikoj, Virginia kaj Lorenzo, kiuj surprizigis min parolante tie nur esperante (eĉ inter ili!) kvankam ili eklernis la lingvon antaŭ ne longe. Fakte, ili instigis min partopreni mian unuan "Internacian Junularan Festivalon". Komence mi dubis ĉu iri aŭ ne, sed poste mi

decidiĝis ĉar por mi la sukceso estis garantiata per tri ingrediencoj: Esperanto + Italio + agrabla kompanio.

Mi volas substreki la perfektan aranĝadon, kiun preparis la viglaj italaj gejunuloj. La programeroj estis vere buntaj kaj interesaj. Tial kaj tiel, la ĉirkaŭ 160 partoprenintoj tre bone kongresis. La temo elektita estis: "Narkotaĵoj en la 90aj jaroj". Do oni parolis pri drogoj, narkotaĵoj, televido, komputiloj...

Se mi devus reliefigi ekzemple iun menciindan programeron, mi indikus almenaŭ tri:

Unue, la prelego de la psikiatro d-ro Tazio Carlevaro pri "Politiko kontraŭ drogoj kaj por droguloj en Svislando". Ĝi estis majstra kaj elstara ekspozicio en perfekta Esperanto. Kompreneble, pri la drogoproblemo ne ekzistas magiaj solvoj. Ŝajne ni devos lerni vivi kun la problemo, ĉar forigi absolute kelkajn problemojn estas danĝera iluzio.



Due, la du spritaj kaj humurplenaj teatraĵoj prezentitaj de la italoj: "Tartufo" (Komedio en du aktoj libere ŝtelita el Molière per la granda grupo "Fia Koincido") kaj "Amo *made in Taiwan*".

Trie, la koncerto de la nederlanda 4-persona muzikgrupo "KAJTO" (kia altira nomo!). Ĉi tiuj simpatiegaj muzikistoj kantis kaj kantigis ludante popolmuzikon. La tekstoj kaj la sonoj estis ege allogaj. Danke al ili ni informiĝis perkante, ke unu el la plej belaj vortoj troveblaj en la vortaro estas "Tohuvabohuo" (ĝi estas ankaŭ la titolo de lasta kompaktdisko en Esperanto, tute aŭskultinda).

Konklude, mi dirus, ke fortune ĉi tiu Festivalo pri drogoj estis unu el la plej allogaj kongresoj de Esperanto, kiujn mi ĝuis. Fakte, iusence, Esperanto (kiel la amo) estas kvazaŭ drogo, ni diru blanka aŭ verda drogo kun bon(ig)aj efikoj: danke al ĝi ni kapablas transiri al pli speciala mondo por sperti novajn emociojn.

*Lorenzo Noguero*

**Esperanta politikisto**

La Konsilio de Eŭropo, organizaĵo de 32 eŭropaj landoj kun centro en Strasburgo, kiu okupiĝas precipe pri homaj rajtoj, elektis la 51-jaran svedon Daniel Tarschys la 12an de aprilo kiel novan ĝeneralan sekretarion por la venontaj kvin jaroj. Tarschys, kiu parolas multajn lingvojn, estas konata al svedaj e-istoj: kiel parlamentano, li salutis esperante la svedan jubilean kongreson en 1987. Li aŭtodidakte lernis Esperanton infanaĝe kiel unuan fremdlingvon, korespondis tutmonde, membris en Sveda E-Federacio kaj partroprenis en la 41a UK (Kopenhago, 1956).

*Informa Fako de UEA*

## Denove pri
# hispana-esperanta vortarego

"...al la prospero de nia lingvo bona vortaro eĉ pli helpas, ol lernolibro"
*Gaston Waringhien*

En nia 307a numero ("Boletín", Aŭgusto-Oktobro 1992) ni informis pri la giganta laboro de Fernando de Diego, kiu de antaŭ kelkaj jaroj preparas la *Gran diccionario español-esperanto*. Ni inkludis tiunumere prov-paĝon de la verko (kun i.a. la vorto *agua*), por ke la legantoj vidu, kian nivelon kaj seriozon implicas la vortarego de nia eminenta verkisto kaj tradukisto, kiu —ve!— de antaŭ sep jaroj loĝas en la dista Venezuelo.

Laŭ niaj lastaj informoj, de Diego atingis la literon "R" kaj plu laboras entuziasme por fini sian vivo-verkon. La reviziantoj (kelkaj hispanoj plus la portugalo Gonçalo Neves kaj la brazilano Leopoldo Knoedt) ricevis antaŭ duonjaro la literon "A" (ĉ. 10% el la tuta vortaro) kaj tre baldaŭ ricevos plurajn aliajn literojn, depende de la enkomputiliga rapideco. Tre indas mencii nun la nomojn de Octavio kaj Oscar de Diego, fratoj de Fernando, kiuj proponis sian valoran helpon por enkomputiligi ĉion.

Ni volas insisti, ke la vortaro de Fernando de Diego estos epok-fara unikaĵo en Esperantujo, kaj ne nur rilate ties hispanlingvan provincon. Ĝi larĝe superos la *Gran dictionnaire Français-espéranto* de Le Puil kaj Danvy (32.000 kapvortoj), aperintan en 1992, kaj eĉ la *Grande vocabolario italiano-esperanto* de Minnaja kaj La Colla (50.000 kapvortoj), baldaŭ aperontan ĉe niaj italaj samideanoj: *ni povas certigi jam nun,* ke la *Gran diccionario español-esperanto* enhavos minimume 60.000 kapvortojn, t.e., pli ol kiu ajn nacilingva-esperanta vortaro en la mondo.

Jen do alia prov-paĝo, ne definitive redaktita, de la hispana-esperanta vortarego. Frandu bone!:

**ARLEQUÍN**. Arlekeno. *(Fig.)* Pulĉinelo, histriono (*persona despreciable*).
**ARLEQUINADA**. Klaŭnaĵo, folaĵo.
**ARLEQUINESCO**. Arlekena.
**ARMA**. Armilo, armo: *el arcabuz es un ~ antigua* — la arkebuzo estas antikva armo. Defendilo (*de los animales*). (*Mil.*) Forto, armeo: *el ~ de caballería* — la kavaleria armeo. (*Fig.*) Armo: *su pluma es su única ~* —

lia plumo estas lia sola armo. Armeo: *mi hijo ha elegido la carrera de las ~s* — mia filo elektis la armeon kiel sian karieron. (*Her.*) *Escudo de ~s* — blazon-ŝildo; *~s portátiles* — individuaj armoj; *~ arrojadiza* — ĵet-armo; *~ blanca* — blanka armo, pik-armo; *~ de depósito* — magazen-armo; *~ de fuego* — paf-armo; *~ de dos filos* — dueĝa armo; *~ de repetición* — ripet-pafa armo; *~ de retrocarga* — kulas-ŝarga armo; *~s biológicas, atómicas, químicas* — armoj biologiaj, atomaj, kemiaj; *~ homicida* — murda armo; *con las ~s en la mano* — arm-en-mane; *licencia de ~s* — armo-porta permeso; *hecho de ~s* — milita heroaĵo; *estar en _s* — leviĝi ribele kun armoj. (*Mil.*) *Hacer sus primeras ~s* — fari sian unuan kampanjon. (*Fig.*) Fari sian debuton: *hizo sus primeras ~s como abogado* — li faris sian debuton kiel advokato; *llegar a las ~s* — ekuzi la armojn; *medir las ~s* — kruci la spadojn (en duelo); *pasar por las ~s* — fusili, pafmortigi; *poner en ~s* — ribeligi; armi. (*Mil.*) *Presentar ~s* — prezenti armojn; *rendir las ~s* — demeti la armojn, kapitulaci; *tocar el ~* — krii alarmon, alvoki al la armoj; *tomar las ~s* — armi sin. (*Fig.*) *Volver el ~ contra alguien* — direkti la armon kontraŭ iu; *dar ~s, contra sí mismo* — provizi armojn kontraŭ si mem; *velar las ~s* — vigili super la armoj; *de ~s tomar* — senskrupula, rezoluta, kuraĝa; *¡a las ~s!* — al la armiloj!; *¡cuelguen ~s!* — armoj, pendu!; *¡descansen ~s!* — armoj alpiede!; *¡~_s al hombro!* — armoj ŝultren!

**ARMADA**. Mar-armeo; eskadro.

**ARMADÍA**. Floso.

**ARMADILLO**. (*Zoo.*) Dazipo, armadelo.

**ARMADO**. Armita; ŝarĝita: *una pistola ~a* — ŝarĝita pistolo. *Cemento ~* — armita betono; *cable ~* — armita kablo. Provizita; muntita. (*Amé.*) Obstina. (*Amé.*) Man-volvita cigaredo. *~ hasta los dientes* — armita ĝis la dentoj.

**ARMADOR**. Ŝip-ekipisto; muntisto. (*Amé.*) Vest-hoko. (*Amé.*) Veŝto (*chaleco*).

**ARMADURA**. Armaĵo; muntado; skeleto, framo: *~ de lentes* — okulvitra framo; armaturo (*imán, condensador, tejado, cemento*): *~ de la cama* — lit-kadro.

**ARMAMENTISMO**. Armadismo.

**ARMAMENTISTA**. Armada, armadista; armadisto: *carrera ~* — vet-armado; armad-konkuro.

**ARMAMENTO**. Armado, armaro; ŝip-ekipo; armoj (*de soldado*).

**ARMAR**. Armi: *~ con un fusil* — armi per fusilo; *~ a cien mil hombres* — armi cent mil homojn; ŝarĝi (*armas de fuego*); fiksi (*bayoneta*); streĉi (*muelle*); ekipi (*barco*); starigi, munti (*tienda de campaña, cama*): munti (*máquinas*); refirmigi, refortigi, prepari, aranĝi: *~ una fiesta* — aranĝi feston. Havigi, doni: *le han armado de una buena educación* — oni havigis

al li tre bonan edukadon. Fari, kaŭzi: ~ *un ruido, jaleo, un escándalo* — fari bruegon, tumulton, skandalon. Krei: _ *de dificultades a uno,* krei malfacilojn al iu. (*Amé.*) ~ *un cigarrillo* — rulumi cigaredon. (*Fig.*) (*Fam.*) ~*la,* ~ *una buena,* ~ *un lío,* ~*la buena* — fari skandalon, fari kravalon*, bruegi, krei pandemonion; ~ *una intriga* — makinacii, intrigi; ~ *pendencia* — serĉi kverelon; *¡buena la has armado!* — bonan kaĉon vi kuiris!; ~*se*: Armiĝi, armi sin; ~*se de una escoba* — armi sin per balailo. Eksplodi: *se armó una riña* — eksplodis disputo. (*Amé.*) Subite halti. (*Fig.*) Armi sin: ~ *se de paciencia, de valor* — armi sin per pacienco, per kuraĝo. Minaci: *se está armando una tempestad* — minacas ŝtormo. (*Fam.*) *¡qué lío se armó!* — kia kravalo*, kia skandalo formiĝis!; *se va a* ~ *la de Dios es Cristo, la gorda, la de San Quintín* — la skandalo estos eminenta; kio venos, tio estos nigro sur nigro, desastro sur katastrofo.
**ARMARIO**. Ŝranko: ~ *de luna* — spegul-ŝranko; ~ *botiquín* — medicin-ŝranko, kuracilujo; ~ *empotrado* — enmura ŝranko; ~ *aparador* — servico-ŝranko.

*La redakcio*

---

# Originala Poezio

## Fray Luis de León

La spiritan homon nek potenco, nek trezoro
povas tenti, ĉar ĉi tiuj nur l' eksteron vestas
vane; al li pleje gravas la esenca koro,
kiu gajan tagon kaj trankvilan nokton festas.

Meze de ĝardena ravo, ĝoja en laboro
simpla, al l' okulta vojo li proksime restas,
dum sur maroj for aspiroj flugas pro fervoro
nur por sinki en teruro kiam ektempestas.

Preter la diurno en maregon, kies ondoj
krevas fajre sur eternon, al brilegaj mondoj
de la dioj, la kontemplo levas lian psikon.

Tien alte saltus li, avida por respondoj;
tie ĉi sur tero, tamen, trovas li l' eksplikon,
en klareco vera agnoskante ĝin, muzikon.

*Timothy B. Carr*

Repliko al s-ro KAMAĈO Georgo

# MIMOO Ludoviko pri la koncepto de la skolo Analiza

Oni povus konjekti, ke la verko "Esperanto por la jaroj du mil" estas futurisma. Nu, ĝi estas tia nur rilate la generaciojn, al kiuj ĝi estas destinita, sed laŭ la enhavo ĝi estas ĉiutempa, kaj Zamenhofo povus esti dirinta ĉion same en 1888, kaj en la jaro tri mil estus ŝanĝenda en la lingva strukturo nenio nun ŝanĝenda. Novaj aferoj necesigos novajn vortojn, sed ne gramatikajn ŝanĝojn. La Lingvo Internacia nepre devas esti fiksa, ne varia, ĉar nur tia ĝi taŭgos ĉiam por sia funkcio.

La limoj de la lingvo Esperanto estas strikte determinitaj sur la bazo de la logiko, konforme al la rekomendo de Zamenhofo,

a) de la gramatiko (scienco, kiu difinas la lingvajn elementojn ne arbitre, sed laŭ ilia funkcio).
b) de la lingvaj reguloj.
c) de la postuloj de analogio: ne estas aplikebla, kio ne estas ĝenerale aplikebla.

## Esperanto kaj la logiko

La opinioj de s-ro KAMAĈO Georgo pri Esperanto kaj la logiko baziĝas sur groteska eraro. La logiko, por ne perdiĝi en malplena spaco, por esti kaj resti aplikebla, bezonas ion, al kio ĝi rilatas. Ĝi devas havi rilatan sistemon. Kiam Zamenhofo diras, ke "en la Lingvo Internacia oni devas obei sole nur la logikon" kaj kiam Mimmoo diras, ke "logiko estas la fundamento de la Fundamento de Esperanto", ili ambaŭ volas diri, ke por rezultigi ĝustan Esperanton oni devas apliki la logikon al la baza kodo de la lingvo. Sed tio nek malhelpas nek malpermesas, ke por serĉi, por karakteri, por spriti, por ĉarmi, por esprimi iun ajn intencitan mallogikaĵon, absurdan pensadon, literaturan efikon, oni faru tion per la rimedoj, kiujn la lingvo metas sub la disponon de la uzantoj. Brila stilo kaj brilaj paradoksoj reciproke ne kontraŭdiras sin. Lingvo absolute logika ne bezonas esti idealo. Sed ja estas idealo laŭeble ĝusta apliko de la logiko al la baza kodo.

La adjektivoj, tiel instruas la regulo tri, finiĝas per -a. Ili povas alpreni ankaŭ la literojn -j kaj -n por la pluralo respektive por la akuzativo. Sed apud ili ekzistas en la Universala Vortaro adjektivaj radikoj sen apostrofo. Tiuj do estas ne varieblaj. Tio estas paca kunekzistado kaj ne kontraŭas la logikon. Tio kompreneble validas analoge ankaŭ por la vorto "ambaŭ".

La senpera sustantivigo de la participoj en la senco de personoj estas konvencio. Tiu konvencio, rimarkinda pruvo por la disciplENO de la Esperantistoj, laŭ mia sperto estas senproblema. Ĝi funkcias bone kaj neniam estas provokinta disputojn. Zamenhofo mem prijuĝas tiun uzon en la paragrafoj 114 kaj 116 de liaj Lingvaj Respondoj. Pri

la nelogikaj sekvoj ĉe la pluformado oni devas atenti kaj, se necese, eviti ilin. Esperanto tute ne estas facila lingvo. Ankaŭ ĝi havas siajn limojn. Ĝi povas esti eĉ tre malfacila. Ankaŭ mankas ankoraŭ vere bonaj vortaroj kaj vere bonaj gramatikoj. Sed tio sinjoron KAMAĈO Georgo ne ĝenas. Mallogikeco, laŭ lia propra eldiro, certakvante kaj nemezureble logas kaj ĉarmas lin. Tio ekzemple koncernas la vortojn terpomo, movado, denove, fervojo, sed evidente ne la vorton "regurbo", kiun li opinias Ŝulcismo, kvankam ĝi estas eltrovaĵo de Mimoo Ludoviko.

**La logiko kiel decida instanco**

En sia recenzo de la Banalaj Historioj de ĈERSKJO Aleksandro s-ro KAMAĈO Georgo atentigas min pri du frazoj, ĉe kies tradukado mi tre banale eraris. Jen ili:

a) Nur nun li konsciiĝis, ke li *estis* libera kaj ke li *estis* nur dekokjara (p. 81).
b) Kvankam ŝi sciis, ke mi *estis* Juda infano (p. 117).

Mi nun memstarigas la du subpropoziciojn:

a) Nur nun li konsciiĝis: "Mi *estas* libera, kaj mi *estas* nur dekokjara"
b) Kvankam ŝi sciis: "Ŝi *estas* Juda infano".

Mi nun citas MIMOOn Ludovikon. "Ĉiu verbo en subpropozicio havas la saman tempon aŭ modon, kiun ĝi havus, se ĝia propozicio fariĝus memstara". (Komplementa volumo p. 24, -18) Kaj nun, laŭ tiu ĉi regulo de la skolo Analiza, mi korektas la du supraјn frazojn:

a)Nur nun li konsciiĝis, ke li *estas* libera kaj ke li *estas* nur dekokjara.
b) Kvankam ŝi sciis, ke mi *estas* Juda infano.

*Noto*: La decida instanco en tiu ĉi kazo, estimata s-ro KAMAĈO Georgo, estas la de vi malestimata logiko.

Ankoraŭ mi citas MIMOOn Ludovikon: "Kiam posesivo troviĝas en frazero kvalifikanta sustantivon, kiu ne estas la subjekto sed troviĝas post la subjekto, ĉar en tiaj frazeroj estas subkompreno de la kopula verbo "esti", refleksivo povas rilati nur al tiu sustantivo, neniam al la subjekto de la propozicio"

Ekzempla frazo: "Li suprenigas la kolumon de *lia* eluzita vintromantelo, tiras la ĉapon sur la frunton..." Kies estas la kolumo? Ĝi estas de *lia* eluzita vintromantelo. Estus sensencaĵo supozi, ke la kolumo estas de *sia* vintromantelo. Kolumo ne havas vintromantelon.

Alia ekzemplo: "Ariko sidis ĉe la lito (, kiu estis) de *lia* patrino. "Kies estis la lito? Ĝi estis de *lia* kaj ne de *sia* patrino, ĉar lito ne havas patrinon.

*Noto*: La decida instanco ankaŭ en tiuj ĉi kazoj ree estas la logiko, kaj ne iu kaprico de MIMOO Ludoviko aŭ iu lingvouza papagumado.

**La enklitiko "ĉi"**

Kiam s-ro BERMANO Hermano korektas "ĉi tiu" al "tiu ĉi" (Speciala Cirkulero 62, p.4, -15), li sekvas la

ekzemplojn en la Universala Vortaro. Inter ili la partikulo "ĉi" prezentas ekskludе enklitikan uzon. Ne havanta propran vortosencon, "ĉi" plenumas la funkcion pli proksimigi la sekvantan sintagmon al la antaŭiranta determina adjektivo. Kaze de kontraŭdiroj inter la Ekzercaro kaj la Universala Vortaro pli validas kiel leĝeca Fundamentoparto la Universala Vortaro. En la historio de Esperanto la Ekzercaro kaj la Antaŭparolo apartenas al la unuaj gravaj aplikoj de la baza kodo de Esperanto. Ili mem jam estas tekstoj en la nova lingvo. Per ili, do per Zamenhofaj modeloj, tradiciiĝas la Hindoeŭropa origena lingvostrukturo de Esperanto. Estas absolute ne bagatelaĵo, ĉu oni diras "tiu ĉi" aŭ "ĉi tiu". Ĉiu lingvo bezonas certajn lingvaĵomonerojn por la ordinara, ĉiutaga, interparola komerco, kiujn oni povas uzi kvazaŭ mekanike, sen la neceso, ĉiam denove devi stampi ilin. Bonavole komparu "PIRONO Klaudo kaj la malbona lingvo" (10; -3 ĝis 12; -15).

## La finaĵo -e ne estas uzebla en flanka elemento de vorto kunmetita

Estimata s-ro KAMAĈO Georgo, vi pravas dirante, ke en la Ekzercaro oni povas legi: "Mi faros al vi donacon, ke ĉe ĉiu vorto, kiun vi diros, el via buŝo eliros aŭ floro aŭ multekosta ŝtono." (Paragrafo 15; 7) Sed vi malpravas asertante, ke tio estas bona aŭ eĉ modela Esperanto. Ambaŭ ĝi ne estas. MIMOO Ludoviko diras: "Flankoelemento de vorto kunmetita ne povas havi la finaĵon -e." Tio ne estas Mimoa fantazia elpensaĵo, sed rezulto el liaj esploraj pripensadoj, parte el liaj vortofaradaj ekkonoj. Jam VARENGJENO Gastono sentis sin maltrankviligita per tiu prefikse uzata adverbo "multe" kaj provis pravigi ĝin per la ĝenerala lingvouzo. Li diris: "Speciala kazo estas ĉe *multe*, kiu estas uzata anstataŭ multo (ekzemple: multo da floroj), kaj kiu sian adverban formon povas konservi ankaŭ kiel maldekstra flankoelemento, ekz-e *multedira, multesignifa.*" Jes, ja, ĝi povas. Sed tio estas neniuokaze pravigebla, ĉar se flanka elemento en kunderivita vorto estas adverbo, oni devas uzi ĝin disa. Bona estas mult*a*kosta ŝtono, la ŝtono kostas multe aŭ, tre elegante, la ŝtono estas tre kosta. Ankaŭ en la Hispana lingvo, en analogaj kazoj, oni uzas *muy*, kaj ne *mucho*. Mi supozas, ke ankaŭ por s-ro KAMAĈO Georgo estas malpli preferinde "bontrafi" kaj "bontrafo" ol "bone trafi" kaj "bona trafo".

Ĉar ni estas ĵus malfermintaj la paragrafon dek kvin de la Ekzercaro, ni ĵetu rapidajn rigardojn sur la frazojn unu, kvin kaj ses. La unuan ni komparu kun la komenco de la dek ses reguloj:

"1) Artikolo nedefinita ne ekzistas;...", kaj la du aliajn kun siaj "kiel" kaj "tiel" ni komparu kun la klarigaj tradukoj en la Universala Vortaro pri "kiom" kaj "tiom". "En *unu* tago, kiam ŝi estis..."(1) -"Vi estas *tiel* bela, *tiel* bona kaj *tiel* honesta,...(5) "...*kiel* granda estas la ĝentileco..."(6)


En tiuj ĉi frazoj speguliĝas tristige la ĥaosa stato de nia lingvo. Ĉu eble vi, s-ro KAMAĈO Georgo, ankaŭ volas akceli ĝin? Kaj kion ni faru per "kiom" kaj "tiom"? En la tuta Ekzercaro ili...ne aperas.

*Ŝulco Rikardo*

# La magio de la parolo

Eble ankaŭ al vi okazis tio. Iun tagon, serĉante en viaj arkivoj inter malnovaj dokumentoj perditan tekston, aperas antaŭ viaj okuloj beletraj notoj el via juneco. En kelkaj kazoj la notoj estis verkitaj de vi mem, kaj tiam vera tumulto de emocioj vekiĝas en via interno, ĉar sendube al ili asociiĝas niaj propraj sentimentalaj viveroj... En aliaj kazoj temas pri beletraj pecoj de niaj preferataj verkistoj, kiujn ni iam ame kolektis, kaj nun, dum relego, ni sentas veran estetikan plezuron malfacile esprimeblan. Tiusence mi legis iam, eble en antikva teksto, belan paragrafon pli malpli jenan:

"Ĉiu poezia vorto, ĉiu lirika parolo aŭ melodia sono, havas magian risorton kapablan per si mem eksplodigi ene de ni apenaŭ ni ĝin tuŝas, profundajn kontentigajn spiritajn sentojn, el kiuj sekvas interna feliĉo dum certa tempo".



Se tiu paragrafo apartenas al iu ajn, mi, sincere tion ne scias. Mi povas certigi nur, ke tio estas ja la magio de la parolo... Per la Parolo nia mondo, la tuta universo, kreiĝis el nenio. La Parolo estas la Verbo, kiu kreis la ekziston, la inspiron, la amon...

Sen tiu transcenda signifo, sed kun profunda plezuro, mi sentis hodiaŭ la parfumon kaj magion de la parolo, kiam mi legis beletran pecon de Rabindranath Tagore, kiun mi hazarde trovis en miaj arkivoj, kie ĝi sidis dum kelkaj jardekoj. Kiel tiam, mi sentis imperativan postulon ne nur ĝue legi kaj relegi ĝin, sed ankaŭ ĝin reprodukti kaj publikigi en revuo, kvankam mi scias, ke multaj aliaj personoj jam legis kaj relegis ĝin. Ho, ekzistas tiom malmultaj puraj plezuroj en nia vivo, ke doni okazon al niaj amikoj gustumi belecon, fariĝas devo nekontestebla! La ekskvizita beletra peco de Tagore tekstas:

**La filo**

—El kie mi venis, kiam mi vin renkontis? —demandas infano al sia patrino.
Ŝi karese premetas lin kontraŭ sia brusto kaj kun milda ploro-rido kortuŝe lin respondas:
—Vi estis kaŝita en mia koro kiel plej granda aspiro, amo mia!...

—Vi estis ankaŭ en la pupoj de mia infaneco, kaj, kiam ĉiumatene mi imagis la formon de dio, per argilo mi vin faris kaj malfaris.
—Vi estis kiel dio en la altaro de mia domo, kaj adorante lin, ankaŭ vin mi adoris.
—Vi estis en ĉiuj miaj esperoj kaj en ĉiuj miaj karesoj...
—Vi vivis en mia vivo kaj en la vivo de mia patrino.
—Vi estis kreata, jarcenton post jarcento, en la interno de la senmorta spirito, kiu superregas mian hejmon.
—Kiam mia adoleska koro malfermis siajn foliojn, vi ŝvebis kiel delikata aromo ĉirkaŭ ĝi. Via tenera mildeco ekfloris tuj en mia juna korpo, samkiel la lumo helas ĉe Oriento antaŭ la suneliro...
—Unua amo el ĉielo! kiel frato de la tagiĝa lumo, vi descendis en la mondon tra la rivero de la vivo, kaj, fine, vi haltis en mia koro mem!

Ĉu vi volas kredi min, karaj legantoj, ke kiam mi trovis ĉi tekston de Rabindranath plurajn jardekojn konservitan, kaj relegis ĝin, mi konstatis, ke ĝi ne perdis la delikatan parfumon, kiun ĝi iam havis? Mi certas, ke pli ol unu el niaj legantoj relegos ĉi pecon kun sama estetika fervoro, kiel mi ĝin legis. Sendube la magio de la parolo transsaltas la tempon!

*María Pilar*

---



## Recenzoj

**Adresaro de Hispanaj Esperantaj Grupoj**
kunordigita de Lupe Sanz Bueno. Marto 1994.

Lupe Sanz, profesia bibliotekistino pri teknologiaj temoj, entreprenis kun talento la aparente simplan taskon kiu koncernas la kolektadon kaj kunordigadon de ĉiajn eblajn specife administrajn donitaĵojn pri la diversaj Esp-aj Grupoj de Hispanio.

Tiu Ci 2a eldono de la "Adresaro..." inkludas la komentojn de kelkaj grupoj al la 1a eldono, aperinta en 1992, kune kun paĝo dediĉita al *utilaj informoj* koncerne al esperantaj restadejoj en la mondo, hispanaj korespondaj kursoj, hispanaj librovendejoj de esp-a materialo, perantoj de esp-aj revuoj kaj turismo en Esperanto.


La broŝuro konsistas el 9 paĝoj kun la plej kompletaj ekzistantaj donitaĵoj de la ĝisnunaj esp-aj grupoj, kaj ĝi komplementas la Nacian Adresaron, kiu meritus aktualigon.

La kampoj de donitaĵoj adaptiĝas al ĉiu interesa havebla informo rilatanta al ajna asocio (aliĝo al pli granda organizo, kunventago, perioda eldonaĵo, konto-numero ĉe banko, ktp).

Por venonta eldono mi sugestas al la aŭtorino inkludi mencion pri la Pasporta Servo de TEJO en la paragrafo "Esperantaj Restadejoj, kaj informiĝi ĉu ankoraŭ ekzistas, aŭ ne, la korespondaj kursoj de ILEI kaj de "Club d' amics de UNESKO" de Barcelono.

Kiel resumo, mi trovas, ke la broŝuro estas vere interesa fonto de donitaĵoj, tre utila por la hispana esperantistaro kaj poor tiuj, kiuj deziras koni la bazon de la nacia movado.

*Juan Carlos Ruiz*



# Recenza Aldono

Fernando de Diego,
*Nuevo método de esperanto para clases y autodidactas*,
Venaria (Torino),
Heroldo de Esperanto,
1993 (2a eldono), 214 p.

En la antaŭlasta numero (313) de *Boletín* aperis mia recenzo pri tiu ĉi lerno-libro de F. de Diego. Laŭ la peto de pluraj legantoj, mi aldonas nun laŭteman indekson de *Nuevo método de esperanto*, ĉar ĝi ege plirapidigas serĉadon de unuopaj gramatikeroj.

Tamen mi volas profiti la okazon por aldoni ion al mia recenzo: la gramatiko de F. de Diego ne celas verajn komencantojn, sed progresintojn kun ioma scipovo de esperanto, kaj nur eventuale memlernantojn kun tre-tre forta volo lerni. Tiu karaktero havas avantaĝojn kaj malavantaĝojn: la libro ja kapablas respondi detale kaj plene la plej harfendajn gramatikajn demandojn de entuziasma progresinto; tamen, ĝi bezonus tri-kvar pliajn ĉapitrojn en la komenco por plifaciligi la eklernon al la veraj komencantoj.

La recenzo baldaŭ aperos en *Kataluna esperantisto* kun la nuna rimarkigo kaj aliaj malpli gravaj modifetoj.

*Antonio Valén*

# Laŭtema indekso de *Nuevo método de Esperanto*


Acusativo de cantidad . . . . . 37-149
Acusativo de frase elíptica . . . 36-45
Acusativo de movimiento . . . . 84
Acusativo de tiempo . . . 37-61-149
-aĉ- . . . . . . . . . . . . . . . . 65-73
-ad- . . . . . . . . . . . . . . . . 54
Adverbiales, formas . . . . . . . . 46
Adverbio + preposición . . . . . 138
ajn . . . . . . . . . . . . . . . . 114
-aĵ- . . . . . . . . . . . . . . . . 53
al . . . . . . . . . . . . . . . . 47
alies . . . . . . . . . . . . . . . 161
-an- . . . . . . . . . . . . . . . . 65
Animales (gritos de) . . . . . . . 88
ankaŭ . . . . . . . . . . . . . . . 53
anstataŭ . . . . . . . . . . . . . 140
-ant-, -ul-, -ist- . . . . . . . . . . 150
anta . . . . . . . . . . . . . . . 73-85
Antecedentes . . . . . . . . . . . 50
apenaŭ . . . . . . . . . . . . . . 112
Aposición . . . . . . . . . . . . . 45
apud . . . . . . . . . . . . . . . 116
-ar- . . . . . . . . . . . . . . . . 77
Artículo . . . . . . . . . . . . 37-131
Atributo . . . . . . . . . . . . . 61

ba! . . . . . . . . . . . . . . . . 162
bastante . . . . . . . . . . . . . 139
bo- . . . . . . . . . . . . . . . . 65
bum! . . . . . . . . . . . . . . . 162

Correlación temporal . . . . . . . 75
Correspondencia . . . . . . . . . 165

ĉe . . . . . . . . . . . . . . . . 83
ĉi . . . . . . . . . . . . . . . . 49
ĉio . . . . . . . . . . . . . . . . 150
ĉirkaŭ . . . . . . . . . . . . . . 119
ĉit! . . . . . . . . . . . . . . . . 162
-ĉj- . . . . . . . . . . . . . . . . 77
ĉu . . . . . . . . . . . . . . 37-73-95
da . . . . . . . . . . . . . . . . 63
dank' . . . . . . . . . . . . . . . 86
datoj . . . . . . . . . . . . . . . 105
de . . . . . . . . . . . . . . . . 63
de (español) . . . . . . . . . . . 71
dedos . . . . . . . . . . . . . . . 78
devi . . . . . . . . . . . . . . . 135
dis- . . . . . . . . . . . . . . . . 87
disde . . . . . . . . . . . . . . . 163
do . . . . . . . . . . . . . . . . 141
dum, dume . . . . . . . . . . . 45-97

-ebl- . . . . . . . . . . . . . . . 56
-ec- . . . . . . . . . . . . . . . . 55
eĉ . . . . . . . . . . . . . . 84-103
Edad, expresiones de . . . . . . . 105
-eg- . . . . . . . . . . . . . . . . 65
ej- . . . . . . . . . . . . . . . . 39
ej! . . . . . . . . . . . . . . . . 162
ek- . . . . . . . . . . . . . . . . 54
eks- . . . . . . . . . . . . . . . . 77
ekster . . . . . . . . . . . . . . 140
ekster, ekstere . . . . . . . . . . 45
el . . . . . . . . . . . . . . 49-63-164
-em- . . . . . . . . . . . . . . . 55
en . . . . . . . . . . . . . 52(18,20)
-end- . . . . . . . . . . . . . . . 86
-eks- . . . . . . . . . . . . . . . 123
-estr- . . . . . . . . . . . . . . . 86
-et- . . . . . . . . . . . . . . . . 55
Expresiones
coloquiales 56-65-77-87-142-154-164
Expresiones corrientes . . . . . . 40
Expresiones de edad . . . . . . . 105

Falsos amigos . . . . . . . . . . 179
fari . . . . . . . . . . . . . . . . 136
Fechas . . . . . . . . . . . . . . 105
fi . . . . . . . . . . . . . . . . . 73
for . . . . . . . . . . . . . . . . 51
Formas adverbiales . . . . . . . . 46
Frases impersonales . . . . . . . . 64
fu! . . . . . . . . . . . . . . . . 161

ge- . . . . . . . . . . . . . . . . 64

Gerundio . . . . . . . . . . . . 37-133
graveda . . . . . . . . . . . . . 162
Gritos de animales . . . . . . . . . 88

ĝis . . . . . . . . . . . . . . 101

ha! . . . . . . . . . . . . . . 162
halo . . . . . . . . . . . . . 161
he . . . . . . . . . . . . . . 161
hot! . . . . . . . . . . . . . 162
huj! . . . . . . . . . . . . . 162
huŝ! . . . . . . . . . . . . . 162

-i- . . . . . . . . . . . . . . 124
-id- . . . . . . . . . . . . . . 53
-ig- . . . . . . . . . . . . 39-151
-iĝ- . . . . . . . . . . . 53-94-151
-il- . . . . . . . . . . . . . . 38
-in- . . . . . . . . . . . . . . 38
-ind- . . . . . . . . . . . . . 39
Infinitivo . . . . . . . . . . . . 38
-ing- . . . . . . . . . . . . . 142
inter . . . . . . . . . . . . . 135
Interjecciones . . . . . . . . . . 161
-ism- . . . . . . . . . . . . . 104
-ist- . . . . . . . . . . . . . 104
-ist-, -ant-, -ul- . . . . . . . . . 150
-iv- . . . . . . . . . . . . . 123
-iz- . . . . . . . . . . . . . 123

ja . . . . . . . . . . . . . . 121
je . . . . . . . . . . . . . . 47
jen . . . . . . . . . . . . 95-141
ju pli... des pli . . . . . . . . . 62
ĵus . . . . . . . . . . . . . . 53

kelka, kelke . . . . . . . . . . 120
kiel . . . . . . . . . . . . . . 61
kiel y laŭ . . . . . . . . . . . 46
kies . . . . . . . . . . . . . . 85
kio . . . . . . . . . . . . . 62-95
kiom . . . . . . . . . . . . . 113
kioma . . . . . . . . . . . . . 47
kiu . . . . . . . . . . . . . . 95
kontraŭ . . . . . . . . . . . . 102
krom . . . . . . . . . . . . . 103
kun . . . . . . . . . . . . . . 117

la . . . . . . . . . . . . . 37-131
landoj . . . . . . . . . . . . . 151
laŭ . . . . . . . . . . . . . . 115
laŭ y kiel . . . . . . . . . . . 46

mal- . . . . . . . . . . . . . . 39
malgraŭ . . . . . . . . . . . . 52
Matématicas, operaciones . . . . 124
Medidas de tiempo . . . . . . . . 104
Medidas y pesos . . . . . . . . . 66
mem . . . . . . . . . . . . . . 94
meti . . . . . . . . . . . . . 152
Métrica . . . . . . . . . . . . 172
mis- . . . . . . . . . . . . . . 76
moŝto . . . . . . . . . . . . . 139

ne . . . . . . . . . . . . . . 133
nepre . . . . . . . . . . . . . 131
-nj- . . . . . . . . . . . . . . 77
Normas de puntuación . . . . . . 169
Notas generales . . . . (Vd. al final)
Notas sobre verbos . . (Vd. Verbos)
nu . . . . . . . . . . . . . . 136
Numerales . . . . . . . . . . . 48
Números . . . . . . . . . . 84-100
nur . . . . . . . . . . . . . . 97

oj! . . . . . . . . . . . . . . 162
oni . . . . . . . . . . . . . . 140
Operaciones matemáticas . . . . . 124
Operaciones consecutivas . . . . 72

pa! . . . . . . . . . . . . . . 162
paf! . . . . . . . . . . . . . 162
Países . . . . . . . . . . . . . 151
Paradigma de los t. compuestos . 26
Participio . . . . . . . 26-61-72-84(5)
per . . . . . . . . . . . . . . 134
Pesos y medidas . . . . . . . . . 66
plej . . . . . . . . . . . . . . 50
pli . . . . . . . . . . . . . 50-64
plu, plue . . . . . . . . . . . 104
plus . . . . . . . . . . . . . 124
po . . . . . . . . . . . . . . 153
por . . . . . . . . . . . . 121-138
porque . . . . . . . . . . . . . 73
post, poste . . . . . . . . 45-85(9,11)

pra- . . . . . . . . . . . . . . 87
Predicativo . . . . . . . . . . . . 152
Preposiciones + verbo . . . . . . 46
preter . . . . . . . . . . . . . . 63
Pretéritos . . . . . . . . . . . . 74
pri . . . . . . . . . . . . . . . 99
pro . . . . . . . . . . . . . . . 139
Pronombres personales . . . . . . 36
Pronombres posesivos . . . . . . 36
pum! . . . . . . . . . . . . . . 162
Puntuación, normas de 169

que (español) . . . . . . . . . . . 132

re- . . . . . . . . . . . . . . . 40
Recíprocos, verbos . . . . . . . . 96
Relativos . . . . . . . . . . . 50-137
retro- . . . . . . . . . . . . . . 123

Saludos . . . . . . . . . . . . . 40
se (español) . . . . . . . . . . . 117
sen . . . . . . . . . . . . . . 83-84
si, sia . . . . . . . . . . . . . . 136
sin f(español . . . . . . . . . . 84
sub . . . . . . . . . . . . . . . 118
Subjuntivo español . . . . . . . . 75
super . . . . . . . . . . . . . . 102
sur . . . . . . . . . . . . . . . 113

ŝŝ! . . . . . . . . . . . . . . . 162
ŝteli . . . . . . . . . . . . . . 163

Tiempo, expresiones de . . . . . 105
Tiempo, medidas de . . . . . . . . 104
ties . . . . . . . . . . . . . . . 96
tio . . . . . . . . . . . . . . . 62
tra . . . . . . . . . . . . . . . 115
trans . . . . . . . . . . . . . . 118
tro . . . . . . . . . . . . . . . 153
tuj . . . . . . . . . . . . . . . 52
-uj- . . . . . . . . . . . . . . . 122
-ul- . . . . . . . . . . . . . . . 55
-ul-, -ist-, -ant- . . . . . . . . 150
-um- . . . . . . . . . . . . . . . 122
VERBOS
Correlación temporal . . . . . 75(11)
devi . . . . . . . . . . . . . . . 135
fari . . . . . . . . . . . . . . . 136
Frases impersonales . . . . . . . 64
Futuro dubitativo español . . 50(15)
Futuro implícito español . . . 49(10)
Gerundio . . . . . . . . 37(9)-133(5)
-ig- . . . . . . . . . . . . . . 39-151
-iĝ- . . . . . . . . . . . . 53-94-151
Infinitivo . . . . . . . . . . . 38(12)
meti . . . . . . . . . . . . . . . 152
Mi devas kapti — Mi kaptu 120(23)
Lexema adj. + morfema verb. 74(8)
Participios . . . . . . . 26-61-72-84(5)
Perífrasis verbales españolas 98(10)
Preposición + verbo . . . . . . . 46
Subjuntivo español (volitivo) 75/10)
Traducción de -is al español . . 74(9)
Verbos derivados
de lexemas nominales . . . . 100(12)
Verbos de sensación física . 103(20)
Verbos no pronominados en E-o 164
Verbos que admiten
CD/CI indistintamente . . . 100(13)
Verbos recíprocos . . . . . . . . 96(6)

NOTAS GENERALES:
Adj. = Adv. predicativo . . 152(10)
adj. + sust. deformados . . . 114(5)
Adjetivo por CN . . . . . . . . . 84(3)
"aliformiĝas" . . . . . . . . . . 97(9)
"dediĉateco" . . . . . . . . . 152(8)
"har-stariga" . . . . . . . . . 151(4)
homo-simio, franca-germana 116(9)
kara = karulo . . . . . . . . 121(27)
koloroj . . . . . . . . . . . . 119(20)
konsisti en ≠ konsisti el . . 121(25)
"studi kvar kvin tagojn
semajne" . . . . . . . . . . . . 84(8)
li vidis efektiviĝi + Acusativo 163(6)
"nekultivebleco" . . . . . . . 116(11)
"ne povi ne" . . . . . . . . . . 114(6)
Oraciones de pasiva . . . . . 119(16)
"plenplena" . . . . . . . . . . 152(7)
"ricevintus" . . . . . . . . . . 161(1)
"se konfesi la veron" . . . . 120(22)
sinsekve . . . . . . . . . . . 119(19)
situanta . . . . . . . . . . . 119(17)

★

**Depósito Legal: Z-334-90**
**Presejo: Aragonesa de Reproducciones Gráficas**